

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 6 Junio, 2012

Kara Leganto, kiel kutime, ni denove salutas vin sur la paĝoj ne la bulteno. Vi trovos mallongan resumon de la raporto de s-no Marko pri lia sperto lerni la hispanan en Gvatemalo; ankaŭ, kiel la angla minacas la italan en la Milana Politekniko (Milano estas ĝemelurbo de la Ŝikago); kelkajn interesajn informojn pri la internaciaj E-ekzamenoj kaj pri la venonta UK de E-o.

Al nia prezidanto d-ro L. Kordylewski ni deziras sukcesan kongresumadon en Teksaso!

—La Redakcio

Vojaĝo al Gvatemalo


En Januaro mi vojaĝis al Gvatemalo por plibonigi mian hispanan lingvon. Mi decidis lerni la hispanan lingvon post mia visito al Cancun, kie evidentiĝis, ke mi ne eblis komuniki kun multaj homoj, spite tion ke mi eblis paroli la anglan kaj Esperante.

Mi elektis Gvatemalon, ĉar lerni la hispanan lingvon en Gvatemalo estas tre malmultekosta afero: tio ĉi \$150 por unu semajno de lernado kaj loĝado kun manĝaĵoj. Estas 20 horoj da lernado semajne kaj estas unu intruisto por unu lernanto.

Bedaŭrinde mi legis, ke Gvatemalo estas sufiĉe danĝera loko. Sed mi jam aĉetis mian flugbileton. Do mi decidis iri spite la danĝero. Tamen la nokto antaŭ mi vojaĝo mi tute ne eblis dormi. Mi alvenis en la flughaveno de la ĉefurbo ne sciante, kiel mi sukcesos trovi hotelon, kvankam mi rezervis ĉambrojn en tri hoteloj. Sed post kelkaj minutoj de serĉado mi renkontis viron kun ŝildo sur kio estis skribita “Marc Shifrot”. Tiu viro ŝoforis min al la urbo Antigua. Mi promenis en la urbo kaj poste venis viro, kiu ŝoforis min al la turista urbo Panajachel.

Tie mi trovis unu el la tri hoteloj en kiuj mi rezervis ĉambron antaŭ mia foriro de Usono. Mi bone dormis kaj ellitiĝis je la sesa. Mi manĝis la manĝaĵon kunportitan de Usono kaj trinkis la akvon kiu estis en la hotela botelo. Mi promenis al belega lago Atitlan kaj poste renkontis la veturilon kiu vojaĝigis min al la urbo Huehuetenango (vd foton), kie estis mi una lingvolernejo.

La lingvolernejo en Huehue estis tre malgranda kaj mi loĝis kun la familio kiu estris la lernejon. Tiu familio ne estis riĉa. Ili eĉ ne havis aŭton. Sed ili ankaŭ ne estis malriĉa. Ili bone manĝis kaj ilia domo estis bonkvalita. Mi komencis kompreni ke la vivo en Gvatemalo ne estas luksa sed ĝi



ankaŭ ne estas tiel danĝera kiel mi antaŭe pensis.

En tiu lernejo mi sekvis ses horoj da lernado tage. Estis tri seancoj de du horojn: du seancoj en la mateno kaj unu en la posttagmezo. La posttagmeza seanco estis nur konversacio. La matenaj seancoj estis praktiko kun verboj, ĉar la verboj en la hispana lingvo estas komplikaj. Preskaŭ ĉiu instruisto estis en la hispana lingvo. Mi tamen spertis ke estis multe pli facila kompreni la hispanan lingvon de

la instruistoj ol la hispanan lingvon de la homoj surstrate.

Ĉiutage mi havis du horojn da hejmtaskoj. Mi uzis la reston de la tempo por piediri tra la urbo, spekti la urbon kaj aĉeti kelkajn bagatelojn. Semajnfino estis libera por piediri, legi kaj fari iom pli da hejmtaskoj.

La unu semajno mi estis en Huehuetenango. La duan mi pasigis en Xela en alia lernejo (vd la foton) pli granda, ol la lernejo en Huehue. Xela estis pli granda urbo kaj mi loĝis kun familio kiu nur akceptas lernantojn kiel loĝantoj, sed ne havas alian rilaton kun la lernejo. La domo de tiu ĉi familio ankaŭ estis restoracio por la tagmanĝo por la laborantoj de iu librovendejo.

La lernejo en Xela havis lernolibron, kiun la lernejo mem verkis. La instruistoj estis lernantoj de la loka universitato. En tiu ĉi lernejo mi havis nur du duhorajn seancojn tage.

Mi iris al Gvatemalo pensante, ke mi perfektos mian hispanan lingvon en du semajnoj. Tio ne okazis. Mi fakte lernis multon, sed tute ne alvenis al punkto, en kie mi bone regas la lingvon. Mi ankaŭ iris kun multon da timo pri perforto kaj krimo. Mi ne havis iun ajn problemon de tiu speco. Tute male multaj homoj estis tre amikaj. Kvankam mi ne lernis tiom kiun mi volis, tamen estis tre valora sperto.

—Marko Šafrot



Tutmonda KER-ekzameno Okazis en 17 Landoj

Sume 360 personoj en 29 urboj de 17 landoj sabate la 9-an de junio partoprenis en la plej granda ĝisnuna sesio de lingvoekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). La ekzamensesion organizis la komisiono de UEA pri ekzamenoj, kies ĉefrespondeculo estas Katalin Kováts, kaj ĝi jam altiris la atenton de amaskomunikiloj en diversaj landoj. Antaŭ la nuna granda sesio la KER-ekzamenon jam partoprenis entute 570 personoj. Plej populara estas la plej alta nivelo C1. Por ĝi ekzameniĝis pli ol duono el la ĝisnunaj partoprenintoj, entute 298 personoj. Ĉi-foje, en la granda tutmonda sesio, plej populara estas la plej suba proponata nivelo B1, por kiu sin anoncis 144 homoj. 116 personoj volis ekzameniĝi pri la meza nivelo B2, kaj 105 pri la plej alta nivelo C1. Pli ol kvindek homoj en diversaj landoj de monatoj preparis la plej grandan ĝisnunan komunan ekzamenon, kiu komenciĝis je la 9-a mezeŭropa horo. Unu el la ĉi-fojaj KER-ekzamenoj okazis en La-Chaux-de-Fonds, kie havas sian sidejon la Eperanta Civito. Je la horo kiam okazis la KER-ekzamenoj en Eŭropo kaj Azio, ankoraŭ dormis la loĝantoj de Ameriko. Tial dua bloko de la ekzameno okazis kelkajn horojn pli malfrue, por la loĝantoj de Meksiko, Kolombio, Brazilo kaj Argentino. *-Libera Folio*

Internacia Minaco de la Angla: Ne Fortranĉu la Italan!

Spite al ĉiuj rekomendoj de la Eŭropa Konsilio pri plurlingveco, spite al artikolo n° 3 de la Itala Konstitucio, spite al la lingvo kaj al la estonteco de la italaj generacioj, la Politekniko de Milano, kun la konsento de ministro Profumo, ne plu intencas utiligi la italan lingvon dum siaj kursoj por porinstruista doktoriĝo, kiuj disvolviĝos nur en angla lingvo. Tiel la ŝtato, sed ankaŭ la studentoj, akiros de ŝtata universitato duoblan damaĝon: malaltkvalitan formadon (tamen jam okazanta pro la enkonduko de la tiel dirita posttrijara doktoriĝo, kun ebleco daŭrigi kromajn du jarojn) kaj kune kun malaltkvalitaj inĝenieroj, arkitektoj, industriaj desegnistoj, sen itala profesia leksikono, taŭga por komuniki kun samlandanoj kaj administracioj.



Pro tio ni renkontiĝis merkrede la 20an de junio vidalvide al la milana Politekniko, ĉar la itala lingvo ne devas trafi la finon de la tibeta. Ĉiuj kun la forkegoj (ŝveligeblaj, kompreneble) kontraŭ la lingva genocido de la italoj, decidita de la milana Politekniko. Estos centoj kaj centoj la itallingvaj libroj kiuj estos anstataŭigitaj fare de la anglalingvaj. Tia evento neniam okazis en Eŭropo nek sub la naziista okupado nek en Orienta Eŭropo sub la soveta reĝimo! Tiom da verŝita sango kaj da forferitaj vivoj por la libereco de la italoj pere de la Nacia Releviĝo, tri italaj militoj por Sendependeco, du mondmilitoj kaj Itala Kontraŭfaŝisma Rezistado.... por nin trovi diskriminaciitajn en niaj italaj universitatoj mem! "Estas frenezo" kiel deklaris la juĝisto de la Konstitucia Kortumo Paŭlo Grossi. *-E-Societo de Milano*

UK'2014 okazos en Bonaero

La 99-a Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2014 okazos en Bonaero, la ĉefurbo de Argentino. La Estraro de UEA elektis la ĉefurbon el inter tri argentinaj urboj, kun kies organizaj kondiĉoj la Konstanta Kongresa Sekretario Clay Magalhães antaŭe konatiĝis surloke. Argentino gastigos la UKon por la unua fojo, sed Esperanto havas tie jam longan tradicion. La lingvo estis enkondukita en la landon en 1889 fare de la pola rifuĝinto Polasky. La landa asocio de UEA, Argentina Esperanto-Ligo, estis fondita en 1941. Ĉar unu el ĝiaj kunfondintoj estis Tibor Sekelj, estas bela koincido, ke la elekto de Argentino okazis ĝuste en la jubilea jaro de la 100-a datreveno de lia naskiĝo. *-Gazetara Komuniko de UEA*

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Roberto Stalzer
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Junio – S-ro prezidanto raportos pri la Landa Kongreso (Esperanto-Usono)

22an de Julio – Pikniko okaze de la 125-a datreveno de IL

28an de Aŭgusto – Ni estos ricevataj informon pri la UK en Hanojo